

Sud-Rejna Kuriero

Oktobro
2012

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°48

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

La ferioj jam finiĝis, restas memoraĵoj, fotoj kaj rakontoj, kiujn vi povas trovi en ĉi-tiu numero interalie pri Italio kaj Hispanio.

Tiuj eventoj miksiĝas kun eventoj de la nova lerno-jaro, amika tago en Frajburgo, aŭtuna staĝo en Ortenberg.

Krome, jam ekfunkcias niaj verdaj fadenoj en Mulhouse kaj en Saint-Louis. En Espace 110 ankaŭ startis la kurso por progresantoj

En Colmar okazis lingvo-festivalo kun aktivaj afrikanoj el Colmar kaj partopreno de esperantistoj el la regiono kaj el Frajburgo

En novembro okazos samtage "Bédéciné" en Illzach kaj "Justa komercado" en Ungersheim. Dank'al bonvolemaj deĵorantoj, ni sukcesos partopreni en ambaŭ.

Laste ni ne forgesu la Zamenhof-feston de la 15a de decembro en Frajburgo kun jam provizora programo en ĉi-tiu numero.



Vjetnamio

André Grossmann

Programo 2012

ESPERANTO - SOCIETO BASEL

| | | |
|-------|------------|--|
| Lunde | 29.10.2012 | ekde 19a Saint-Louis Babilado "La Fadeno" |
| | 22.11.2012 | en la restoracio „La Poste“ ekde 20a15 Monata kunveno en Riehenring "Programo kaj aliaj aĝoj" |
| | 15.12.2012 | Zamenhofa festo en Freiburg |

La grupo de Frajburgo kore invitas al la Zamenhof-Festo 2012 en Freiburg/Breisgau, Jen provizora programo:

Sabato, la 15a de Decembro 2012

14:00 ??) Vizito de nova urbokvartalo - supozeble Rieselfeld

16:00 (16:30) kafumado en "Treffpunkt", Schwarzwaldstr. 78d (konstruaĵo ZO, sud-orienta angulo)

Parkad-ebleco ĉe Schützenallee aŭ Schwartzwalterstrasse, kordinatoj: 47,987423 - 7,8686

Manfred Westermayer

Bertha von Suttner in Berlin

Fried setzt nun alle Hebel in Bewegung, um einen Besuch Bertha von Suttner in Berlin zu einem Triumph der Friedensidee werden zu lassen und die Pflöcke für die Gründung einer „Deutschen Friedensgesellschaft“ einzuschlagen. Am 16. März 1892 trifft die Schriftstellerin in Begleitung ihres Gatten Arthur um 23 Uhr am Anhalter Bahnhof ein und wird im Hotel Bellevue am Postdamer Platz untergebracht. Fried hat eine Lesung aus dem Roman organisiert und veranstaltet am dritten Tag ein festliches Bankett für 250 Persönlichkeiten aus Politik, Wirtschaft, Literatur und Presse. Es fand im renommierten Restaurant „Englischen Haus“ in der Mohrenstraße 49 statt, in dem sich schon die literarische Gesellschaft „Tunnel über der Spree“ getroffen hatte.

Die konservative Presse spottete : „Wer zum Besten des Weltfriedens mitessen will, hat 6 Mark zu bezahlen, die Karten sind natürlich bei Fried zu haben, nach dem Souper wird die Weltfriedenspfeife geraucht“. Fried treibt die

Gründung der „Deutschen Friedensgesellschaft“ in Berlin weiter voran, und am 9. November 1892 erfolgt die Konstituierung in der Weinstube des Hotels Kaiserhof.

Das Gespann Suttner/Fried wird zum Kern der pazifistischen Bewegung. Fried ist unermüdlich und wertet alles aus, was zum Thema Krieg und Frieden veröffentlicht wird. Dafür wird er später den Friedensnobelpreis erhalten. Dieser Aspekt seines Wirkens ist in Biografien und wissenschaftlichen Studien dargestellt worden.

Fried und von Suttner waren sich der Bedeutung der richtigen Marke in der Propaganda bewußt. Ende August 1901 schreibt ihm Bertha von Suttner : „ Pazifist – merken Sie sich den Ausdruck! Genug mit den Friedens-freunden und der Friedensbewegung. Pazifismus heißt es fortan – ebenbürtig mit den übrigen Ismen : Sozialismus, Feminismus, etc...“ Fried verwendet den Ausdruck konsequent als gemeinsamen Nenner unterschiedlichster Friedensaktivitäten.

Agitator für Esperanto

Es mag schon irgendwann in der Mitte der 1890er Jahre gewesen sein, als Alfred Hermann Fried erstmals mit Esperanto in Berührung kam. Er soll schon 1895 mit Gaston Moch (1859-1935) auch auf Esperanto korrespondiert haben. Beide kannten sich als Mitglieder des „Internationalen Friedensbüros“ in Bern.

Aber erst 1901 entschließt sich Fried dazu, an Ludwig Zamenhof zu schreiben. Dieser beschreibt in seiner Antwort seinen Kummer darüber, dass es in Deutschland keine wirkungsvolle Propaganda für seine Sprache gäbe : „ Sie haben vor sich noch ein ganz freies Feld, denn leider ist Esperanto in Deutschland fast noch unbekannt! Wir haben dort bis jetzt noch keinen einzigen Agitator! Der einzige war Herr H. W. Trompeter in Schalke (Westfalen). Der ist aber jetzt auf Reisen. Ein tüchtiger Agitator war L. Einstein, ist aber gleich in der ersten Zeit gestorben. Die Herren Schmidt und Meyer haben zwar Grammatiken herausgegeben, aber vor 6-7 Jahren, als unsere Sache sich in sehr schlechter Lage befand, sind sie abgefallen“.

Fried stellt fest, dass es kein geeignetes Lehrbuch für den deutschen Sprachraum gibt. Er verabredet mit Adolf Schmidt, dem späteren Leiter des geomagnetischen Observatoriums in Potsdam, der bis 1902 als Lehrer in Gotha gearbeitet hat, ein Lehrbuch zu verfassen. Es soll im Verlag von Fried erscheinen, und Fried legt es, wie es seine Art ist, als umfassendes Medienprojekt an. Es sollten Wörterbücher, eine Grammatik, Übungs- und Lesebücher folgen . Da Schmidt in Gotha, wo er 1898 zum Professor ernannt worden war, nicht vorankommt, muss Fried die Sache selbst in die Hand nehmen.

Amika tago en Frajburgo

La grupo de Frajburgo invitis la samideanojn el la tri-landa regiono al amika tago.

La rendevuo estis ĉe la sidejo de la grupo. Ĉe la katedralo, la dua rendevuejo atendis la ceteraj partoprenantoj.

Apude troviĝis la bazaro kun multaj buntaj floroj, legomoj kaj fruktoj. Ankaŭ budo kun kazeokukoj, pajlaj ŝuoj ktp...



Manfred Westermayer estis nia gvidanto tra la urbo Frajburgo. Ĉe la urbodomo ni vidis la du restintajn urbo-pordegojn "Martinstor" kaj "Schwabentor".

La vetero estis tre favora al agrabla promenado kaj post iom da grimpadado al Schlossberg, eblis ĝui agrablan panoramon al la urbo.

Tie en la bier-ĝardeno estis eblecoj ripozi kaj manĝi sub la arboj.



Panoramo al la urbo Frajburgo

Post tiu agrabla paŭzo estis proponita viziti la kvartalon "Vauban", ekologia verda kvartalo, kie oni uzas mal-multe da aŭtoj.

La domoj estas orientitaj kaj la instalaĵoj estas adaptitaj por kapti la energion de la suno kaj eviti malŝparon de varmo.



Poste la tuta grupo revenis per tramo al la unua rendevuejo. Tie la organizantoj regalis la partoprenantojn per kafo, teo kaj plej diversaj kukoj.

Dankon al Ursula kaj Manfred pro tiu agrabla amika tago.



Andreo kaj ties fotilo kaj komputilo

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2013-2015

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

| Jaro | Kotizo | Abono |
|------|------------|------------|
| 2013 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj |
| 2014 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj |
| 2015 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj |

Pagebla al

André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM
Ĉekojn je la nomo de: Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg.

34a BAVELO- 72a regiona Seminario staĝo de

esperanto
France-Est

Okazis en Germanio de 21a ĝis 23a de Septembro 2012
Junulargastejo Kastelo Ortenberg Burgweg 21

La komuna staĝo de Esperanto-France-Est kaj seminario de Bavelo okazis ĉi-septembre en la ĉarma kastelo Ortenberg. Ĝi troviĝas sur monto kaj ebligas al la gastoj ĝui vastan panoramon al la ebenaĵo kaj al la vitejoj. Parto de tiu kastelo estas administrata kiel junular-gastejo. Tial la organizantoj ĝin elektis kiel la aŭtunan staĝejon.

La unuaj programeroj estis proponitaj jam vendrede posttagmeze, ĉefe al la frualvenantoj. En tiu junulargastejo troviĝas vastaj dormo-ĉambroj kaj diversaj salonoj. La manĝoj estis memservaj kun la mencio: KVAH (kun via afabla helpo) por lavi la manĝilaron. Multaj ne ŝatis.

En la turisma programo estis planitaj vizito al subĉielo muzeo pri malnovaj farm-domoj kaj uzado de starveturiloj en Strasburgo.



Tial Frank Huber interese prelegis kaj klarigis pri tia veturilo. Malgraŭ ke ĝi havas nur du radojn ĝi restas stabila kaj ne renversiĝas dank'al elektronika sistemo.

Tamen nur 8 partoprenantoj kuraĝis ilin uzi en Strasburgo.



Aliaj preferis viziti la subĉielan muzean bienon de la Nigra arbaro. La diversaj farmdomoj estas tre vastaj konstruaĵoj por la loĝantoj, la servistoj kaj la bestoj. Tie eblis ankaŭ vidi kaj eĉ aĉeti la tipan kvasto-ĉapelon de la Nigra Arbaro.



Manfred Westermayer prelegis pri la stacidomo de Stuttgart. Tie staras kap-fervoja stacio. Ekestis proponoj kaj eĉ planoj por konstrui novan tra-iran stacidomon kun avantaĝoj kaj multaj malavantaĝoj.

La loĝantoj kontraŭas tiun projekton kaj Manfred detale analizis la malavantaĝojn ligitajn al tiu projekto.

Tereza Kapista prelegis pri kaj montris multajn fotojn pri sia vojaĝo al Burundo, Tie ŝi instruis Esperanton.

En alia lando Irano, ŝi instruis Esperanton al rifuĝintaj virinoj. Ŝi emfazis kiom malfacilas respekti la striktajn regulojn por virinoj en tiu lando.



Aparte interesa estis la vizito al la kastelo fare de la kastela ĉambelano. Li rakontis pri sia dungigo kiel juna knabo kaj pri siaj respektivaj mastroj en la kastelo. Dum periodo troviĝis tie terura malliberejo por la "sorĉistinoj". Virinoj plej ofte multe pli kleraj ol ties juĝantoj.

Ĉe la fino, iuj partoprenantoj rolis kiel eminentaj gastoj, dum la ceteraj kiel servistoj.

La ĉambelano laŭ protokolo invitis ĉiujn al la kastelo laŭ ties rango.

En vespera programo estis proponita kumuna kantado.



En la junulargastejo en apuda salono troviĝis ankaŭ grupo da junaj muzikistoj.

Tre lerte Ursula enkondukis konatiĝon kun la Esperanto-grupo kaj informis pri la lingvo.

Dankon al la organizantoj pro tiuj agrablaj tagoj.



Raporto kaj fotoj de Andreo kaj ties komputilo

Verdaj Fadenoj en Mulhouse kaj Saint-Louis

La unua verda fadeno de la nova lerno-jaro jam okazis la unuan de oktobro en Mulhouse, ĉe la kutima kafejo, 7, rue du Printemps. Estis decidite daŭrigi tiun agrablan monatan renkontiĝon, respektive en Mulhouse kaj en Saint-Louis kaj eble iam eĉ aliloke, principe en la lasta lundo de la monato.



La celo estas uzi Esperanton por amike babilo sen krokodilado.

La lokoj estas:

En Mulhouse: en la kafejo: 7 rue du printemps

En Saint-Louis: en restoracio de la Poste, 10 rue de Huingue.

Jen la venontaj datoj: 29an de oktobro 2012 en Saint-Louis

26an de novembro 2012 en Mulhouse

Okaze de tiaj renkontiĝoj eblas pruntericevi librojn de nia biblioteko, sed unue sendante mesaĝon al nia dissendolisto.

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

mulhouse-esperanto@yahogroupes.fr

Niaj aktivecoj en Espace 110



ESPERANTO

Adultes, adolescents (16 ans et +)

André GROSSMANN

Découvrez une langue vivante pratiquée à travers le monde. Rapidement accessible à tous, précis, nuancé, adaptable aux évolutions des techniques et des pensées, l'espéranto est un outil d'échange très efficace entre toutes les cultures. Une grammaire sans exception, sans verbe irrégulier. De plus en plus de sites espéranto sur internet, pour apprendre, pour s'informer, pour communiquer et se comprendre.

Mardi : 18h30 à 20h Débutants

Jeudi : 18h30 à 20h Avancés

1^{er} contact : Mardi 18 septembre à 18h30

La kurson por komencantoj prizorgas Jacques en la kadro de la mond-civitanoj.

Jen la teksto pri niaj Esperanto-kursoj, kiu aperis en la nova broŝuro de la Kulturdomo Espace 110 en Illzach por la nuna lerno-jaro 2012/2013.

La kurso por progresantoj jam komenciĝis la 18an de septembro kaj nun funkcias marde anstataŭ ĵaŭde vespere de la 18a30 ĝis la 20a. Ĝin gvidas André Grossmann.


Esperanto-prospekto ĉe la kastelo Haut-Koenigsbourg

Dank'al efika aktivado de Cyrille Hurstel, la kastelo Haut-Koenigsbourg

disponigas al la turistoj prospekton en Esperanto.

Krome ĉe informpanelo estas menciitaj la diversaj lingvoj, por kiuj haveblas prospekttoj.

Sur panelo ĉe la enirejo flagego de Esperanto troviĝas en la lasta pozicio.



Parcourez le château à votre rythme avec un document de visite




La 20-a Internacia Esperanto-Semajno de kulturo kaj Turismo en Cambrils, Katalunio



Ĉi-jare la fama oktobra semajno en Katalunio arigis preskaŭ 150 partoprenatojn el deko da eŭropaj landoj. Ĝi okazis en Cambrils sude de Tarragona en bonega hotelo kun naĝejo kaj en proksimeco de la maro. Aliflanke la hotelo estis iom for de la urbo-centro. Krome en la hotela restoracio ni ĝuis bufedajn manĝojn ege abundajn kun hispanaj vinoj.

La diversaj programoj de la semajno okazis en iom apartigita parto de la granda salono de la hotelo. Tie funkciis eĉ du libroservoj. Rodica Todor el Rumanio havis la malfacilan taskon instrui Esperanton al ne veraj komencantoj. Ŝi proponis krei grupojn por kune diskuti pri iuj gramatikaĵoj kaj pri la uzo de prepozicioj. Entute ŝi bone sukcesis paroli komencintojn kaj doni ideojn al observantoj.

La distraj vesperoj suferis pro la fakto, ke ili ne povis okazi tute aparte de la granda hotelo-salono. Tamen ni povis ĝui la Esperanto-ĉampanon okaze de interkonaj vesperoj.



Aparte interesaj estis la prelegoj de Barbara Pietrzak, ĝenerala Sekretariino de UEA: Temo: Komunikado per dialogo: La 125-jariĝo de la Unua Libro.

Kaj alia prelego de Gian Carlo Figliera. “La belulino (Esmeralda), la monstro (Quasimodo) kaj Notre-Dame (V. Hugo). Dum la semajno okazis du duontagaj ekskursoj, unu al interesa Hispana Esperanto-Muzeo en Sant Pau d'Ordal (Subirats) kaj Ĉampano-kelo “Massana”.

Alia duontaga ekskurso iris al, Monaĥejo de Escornalbou.

Por la Tuttaga ekskurso ni longe veturis al pli suda loko proksima al Valencio, al urbeto Castellon, por tie viziti la Planetarion. Bedaŭrinde neniam traduko estis proponita tie. La anoncita granda surprizo konsistis el grandega paelo, kiun ni ĝuis ĉe malnovaj esperantistoj.

La Ensemblo “Montjuĉ” ne povis veni, ni tamen kune festis la finon de la semajno per la fama “cremat” kaj ricevis la specialajn tasojn de la semajno.



Entute tre agrabla ferio-semajno kun somera vetero, eĉ en oktobro, en Esperanto-etoso. Vonontjare ĝi eble okazos norde de Barcelono.

Andreo

Fotoj de Andreo kaj Rémy

Esperanto-kurso en Colmar

Komence de septembro Fernando NKANU havis la okazon partopreni pilgrimon al Lourdes kaj samtempe turismi vizitante GAVARNIE. Vi eraras, se vi opinias, ke li pasive kunĝuis la vojaĝon, sen zorgi pri Esperanto !!! Vi rimarku lian sakon kun

esperanto-reklamo. Dank'al ĝi li sukcesis eble ree enmovadigi du gelernantojn, kiuj iam lernis nian lingvon. Certe, li bedaŭris, ke ne pli da esperantistoj alparolis lin dum sia vojaĝo ! Do li mem zorgos pri kreskigo de la movado : jen li, kiu instruas en CADA-COLMAR.

Ke li sukcese agadas, tion konstatis la multnombraj regionaj samideanoj, kiuj ĉeestis la de li majstre organizitan lingvofestivalon en Colmar.



E.Ludwig



Lingvofestivalo en COLMAR



Agrabla internacia plurlingveca renkontiĝo okazis sabate, la 20-an de Oktobro 2012 en

Foyer Sainte-Marie, en COLMAR. La

aranĝon **majstre** organizis samideano **Fernando KINKANI**, kiel vicprezidanto de l'asocio **EURO-AFRIKA-SOLIDARECO**.

Helpita de pluraj esperanto-gelernantoj de sia asocio, li sukcesis prezenti interesan programon. Post la bonvenigaj vortoj de la prezidanto, Sinjoro **Blanchard BOKAPA** la atentega kaj ege interesata publiko ĝuis la prelegojn de

- Sinjoro **Gérard CRONENBERGER**, urbestro de la urbeto INGERSHEIM, kiu prelegis pri la alzacaj dialektoj kaj ties situacio en la regiono. En lia urbeto startis antaŭ dekkvino da jaroj la unua privata dulingva lernejo en Elzaso, en kiu oni samkvante instruas la francan kaj la germanan lingvojn. La franca Nacia Eduk-sistemo nur pli malfrue – pro la premo de la gepatroj – proponis, kvazaŭ kontraŭ-vole, samajn ŝtatajn klasojn.
- Sinjoro **Biennu SENE MOGABA** prelegis pri siaj klopodoj krei la necesan vortaron por instrui kemion en la lingvo LINGALA, en la Demokrata Respubliko KONGO.
- Sinjoro **Jozefo CHIRIMWANI SIRONGE**, kiu ankaŭ originas el DRK, prezentis Esperanton.

Parto de la tago krome konsistis en pridemandado al la prelegintoj kaj diskuto inter la partoprenantoj. Proksimume 60 personoj ĉeestis, inter ili esperantistoj el Francio kaj Germanio, Afrikanoj de diversaj asocioj kaj "kelkaj eksteruloj". Dank'al la kontaktoj de "Fernando" la regiona gazetaro plurfoje amplekse raportis.

La aranĝon subtenis **Caritas Alsace**, **Espéranto-France-Est**, **TAKE-Esperanto kaj Mulhouse-Espéranto**.

Ni substreku, ke la komuna manĝo en si mem estis festivalo de internacia gastronomio. Ke plaĉis la tuto demonstris la vigla babilado dum la gustumado. La aranĝo finiĝis kiel tio devis finiĝi: per senbridaj afrikaj ritmoj kaj dancoj!

Kia bela tago!



La 79-a Itala Kongreso de Esperanto 16 - 25.8.2012

Ĉi-jare estis elektita Sicilio por kongresi. Suno, maro kaj Esperanto altiris multajn geesperantistojn el kvin kontinentoj. La kongreson partoprenis pli ol 330 samideanoj el 32 landoj. La itala nacia kongreso fakte fariĝis internacia.

La kongreso okazis ĉe la mediteranea marbordo en multkultura urbo Mazaradelvalo. Mazara havas pli ol 51 000 enloĝantojn. Ĝi situas en la provinco Trapanio. En ĝia historia urbocentro troviĝas multaj preĝejoj kaj aliaj historiaj konstruaĵoj. Tre agrabla

estas promeno en la araba kvartalo tra mallarĝaj stratetoj kun domoj surmure ornamitaj per fajencaj bildoj. Dum la kongreso aldoniĝis fajenca ornamaĵo pri Esperanto farita de lernejanoj de la Arta liceo. Ni kongresis en hotelo "Hopps". Multaj el ni ĝuis la hotelan naĝejon aŭ Mediteranean maron. Pro granda varmeco la homoj posttagmeze siestas. La urbo revigliĝas vespere ĝis malfruj noktohoroj. Amaso da afiŝoj pri prezentadoj por la publiko kaj pluraj surstrataj banderoj anoncis la kongreson. La enloĝantoj havis eblecon "gustumi" Esperanton propraorele kaj propraokule dum ĉiutagaj vesperaj koncertoj.



Dimanĉe okazis la solena inaŭguro de la kongreso. Unue la membroj de la LKK - Bruĉjo Kasini kaj la prezidanto de Itala E-Federacio Aldo Grassini bonvenigis nin. Sekvis paroladoj de profesoro Khaled Fouad Allam pri interkulturo kaj la festparolado de Barbara Pietrzak la ĝenerala sekretario de UEA. Intertempe venis la urbestro, s-ro Nicoló Cristaldi kiu entuziasme bonvenigis nin kaj poste sekvis kutimaj salutoj de E-institucioj kaj de reprezentantoj el diversaj landoj. Post la E-himno la kongreso estis malfermita. La urbestro tre favoras disvastigon de Esperanto. En Mazara estis starigita Centro por Esperanto kaj Interkulturo. Ĝi celas disvastigon de la lingvo en la lernejoj. Jam antaŭ la kongreso pli ol 500 homoj (ĉefe lernejanoj, studentoj kaj instruistoj) sekvis entuziasme kurson de Esperanto. La instruado daŭros ankaŭ estonte.

La temo de la kongreso estis “Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof”. Ĝi estis pritraktita en du seminarioj gvidataj de Kristin Tytgat kaj Elizabeth Schwarzer. La riĉa programo proponis prelegojn, seminariojn, trinivelajn E-kursojn kaj ankaŭ rapidan kurson de la itala lingvo. Katalin Kováts gvidis intensan trejnseminaron por instruistoj kaj instruantoj de Esperanto. Ŝi ankaŭ zorgis pri KER-ekzamenoj kaj disdonis diplomojn al sukcesintoj de antaŭaj ekzamenoj. Ne mankis libroservo, ekspozicio pri Esperanto, prelegoj kun aperitivo por la publiko, promeno tra la urbo kun la urbestro, kantado kun duopo Ankie kaj Nanne de la muzikgrupo Kajto, mediteraneaj vesperoj kun Davide Astori, noktaj junularaj mojosaj programeroj, animitaj de talenta italo Michael Boris Mandirola. Same kiel lastjare okazis Verda Foiro, kaj eblis aĉeti filatelaĵojn kun poŝta stampo de la kongreso.



Sur la ĉefa placo oni starigis podion, kie niaj plej elstaraj kantistoj kaj muzikistoj havis eblecon vespere prezenti koncertojn. Inter la plej famaj estis JoMo, Kim kaj ensemble Kajto. Ĉiuj havis grandegan sukceson kaj plurcentan publikon. Ankaŭ sur la strandoj aperis kelkaj lokaj muzikantoj, kiuj plezurigis laŭstrandajn promenantojn kaj eĉ instigis iujn al dancado sur trotuare. Al buntaj muzikaj vesperaj programeroj kontribuis impresa mezepoka prezentado de sicilia historio en formo de parado. Bela spektaklo de dancoj, teatraĵoj movoj en historiaj kostumoj. Oni komencis ĝin el tempo de grekoj, sekvis araboj, normanoj kaj tiel ĝis nuntempo. La procesio estis spektata kaj forte aplaudata de homoj starantaj sur plenŝtopitaj trotuaroj ambaŭflanke. Alia nokta procesio temis pri la religia parado por Sankta Vito. En la internacia vespero oni multe kantis, gitar- kaj flutludis, deklamis, teatrumis. La etoso estis gaja.

Tre allogaj estis multnombraj ĉiutagaj ekskursoj al diversaj lokoj ligitaj kun la prahistorio de la okcidenta parto de Sicilio. Ni ĝuis vizitojn al la urboj: Palermo, Agrigento kaj la Valo de la Temploj - Erice, salmarĉoj kaj Trapani - Salemi, Sciacca, Sambuca. Interesaj estis la templo kaj amfiteatro en Segesta kaj la temploj de Selimunte. Dum tiuj ekskursoj ni vizitis kelkajn muzeojn: pri konkoj, pano, salo, tinuso. Pluraj ceramikaj vendejoj ravis nin kaj ankaŭ vizito de teatro. Koncerne Sicilion oni ofte pensas pri mafio. Ni ne renkontis mafianojn (feliĉe!), sed ni havis okazon viziti muzeon pri mafio. Ni ŝipekskursis al la insulo Flavignan. Iuj preferis biciklajn ekskursojn kaj promenojn. Ĉie ni renkontis afablajn homojn, kiuj ŝatis paroli kun ni kaj iuj eĉ interesiĝis pri Esperanto. La etoso estis varmega same kiel la vetero. La venonta, jubilea itala kongreso okazos en Ligurio en Kastelaro proksime al San Remo. Tie estos nova okazo ĝui interesan E-aranĝon kaj krei novajn amikajn kontaktojn.

Liba Gabalda

Eŭropa pentro-arto en Japanio, ĉu ebla?

Oni povas meti la japanajn pentristojn en tri kategoriojn en Meiji-periodo. Unu el ili pentris pentraĵojn por lerni pentro-manieron de Eŭropo. Ĝi tamen havis tendecon, ke japana tradicia pentro-maniero iam aperas en liaj artoverkoj. Alia plibonigis la pentro-manieron de la unua grupo per miksado kun tradicia maniero. La lasta esprimis sian individuecon, ne insistante pri nova eŭropa maniero nek pri japana tradicia maniero.

Apartenas al la unua grupo la japana pentristo KURODA Seiki (1866-1924), kiu aktivis en Meiji-periodo kiel kondukanto de franca impresionismo. Eŭropa pentro-maniero multe influis liajn



Figuro 1
Kuroda Seiki
"Legado" (1890-91)
Tokio Nacia Muzeo



Figuro 2
Kuroda Seiki
"Gejšo" (1893)
Tokio Nacia Muzeo

kun la pentraĵo "Gejŝo" (1893) Fig. 2, kiun li pentris, kiam li estis ĵus reveninta al Japanio kaj vizitis Kioton.

Li metis angulon de la ĉambro en la unua pentraĵo. La ruĝa vestaĵo kaj la verda jupo, kiujn lia amikino surmetis, estas plena je ĉifaĵoj kaj havas ombrojn. Pro tio la pentraĵo havas solidan aspekton.

Dume, li ne metis angulon de la ĉambro en la dua pentraĵo. La apogilo, kiun la gejŝo tenas, estas paralela kun la bildo. La kimono, kiun ŝi surhavas, ne havas ombron. Tiuj manieroj igis la pentraĵon ebena. Tiu ebeneco estas karaktero de japana pentraĵo. La desegnaĵo de Kimono altiris lian intereson, kaj li metis multajn kolorojn sur la Kimonon. Ankaŭ tiu ornameco estas karaktero de japanaj pentraĵoj.

Antaŭ foriro de Francio li timis, ke li forgesos la francan pentro-manieron post sia reveno al Japanio. Li skribis leteron al sia adoptopatrino en 1893, ke li timas, ke post sia reveno li ne plu povos lerni la francan pentro-manieron kaj ke malboniĝos lia pentradotekniko, kiun li fervore lernis en Francio. Pro tio li haste imitis la francajn impresionismajn pentraĵojn tuj post sia reveno. Li pentris la pentraĵon "Someraĵoj" (1894) Fig. 3 unu jaron post sia reveno. Li ne metis konturojn ĉirkaŭ motivojn. Li ne metis originalajn kolorojn sed diversajn kolorojn sur la motivojn. Li metis ruĝan koloron kaj flavan koloron sur la trunkojn de arboj. La herboj havas flavan koloron. Vidante tiun pentraĵon, oni povas legi liajn zorgojn pri la futuro de la japana art-mondo.

Tiutempe li ne sciis, ke oni ne povas importi kulturon el alia lando.

M. M.



Figuro 3

Kuroda Seiki

"Someraĵoj" (1894)

Sensukcesa klopodego

Pro invito de Sinjoro Yann KERDILES, dekanon de la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Homaj Sciencoj, en la Universitato de Alta Alzaco en Mulhouse, mi havis la plezuron instrui tie Esperanton dum du sinsekvaj jaroj. En la universitata jaro 2010/2011 la kurso ne ekfunkciis, ŝajne pro iom ĥaosaj perretaj enskriboj.

Tio ne malkuraĝigis la dekanon en septembro 2012. Li lanĉis grandskalan reklamadon, sur la retejo de la fakultato, okaze de Fakultataj Kunvenoj de la profesoroj kaj per invito al prelego fare de Cyrille HURSTEL, kiu tie majstre prezentis la rete legeblan libron de sia filino "Seule à l'étranger pour la première fois" akirebla ĉe AMAZON. Venis dudeko da personoj, inter kiuj pluraj Erasmus-gestudentoj, du profesoroj kaj bibliotekistino de la fakultata biblioteko.



Malgraŭ ĉiuj klopodoj, ne eblis ekfunkciigi la kurson, ĉar ne enskribiĝis la postulitaj 12 gestudentoj.

Pluas la invitoj al la fakultataj plurlingvaj poeziaj vesperoj, kie mi klopodos pluekzistigi nian lingvon.

Edmond LUDWIG



Nia grupo akceptis eksterlandajn gastojn.

La 13an de septembro Michel Basso proponis kune manĝi en restoracio en Eguisheim.

Familio Pfennig el Germanio vizitis kvar-ope Alzacan kaj kontaktis Michel. Ni retroviĝis ĉe granda tablo en tiu restoracio. Agrabla etoso por kune ĝui la alzacan gastronomion kaj Esperanton.

Fotoj kaj raporto: **Andreo**



Nia Kalendaro 2012/2013

| | | |
|--------------------------|---------------------|--|
| Novembro 2012 | 13 - 20 - 27 | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a |
| | 17- 18 | Bédéciné en Espace 110 de * Sabate de 9a ĝis la 18a * Dimanĉe de la 9a ĝis la 17a |
| | 17- 18 | Commerce Equitable en Ungersheim * Sabate se la 14a ĝis la 18 * Dimanĉe de la 10a ĝis la 17a |
| | 26 | Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en restoracio de la Poste, 10 rue de Huningue en Saint-Louis. |
| Decembro 2012 | 2a | Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps" 7 strato du printemps 68100 Mulhouse |
| | 4 - 11 - 18 | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a |
| | 15 | Zamenhof-festo en Frajburgo, informoj sur paĝo 2 |
| Januaro 2013 | 8 | Ni kune festos la 3 reĝoj en Espace 110 anstataŭ nia kutima kurso de la 18a30 ĝis la 20a |
| | 15 - 22 - 29 | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a |
| | 28 | Lunda konversacia kunveno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo "le Printemps" 7 strato du printemps 68100 Mulhouse |
| Februaro 2013 | 5 | Membro-kunveno en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a |
| | 12 | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a |

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



Fotoj el Kamboĝo

